Francilia federacio de esperanto

INVITO
Ĝenerala Asembleo la 20an de marto 2021

Kara membro,

La oficiala ĝenerala asembleo 2021 de la francilia federacio de esperanto okazos sabaton la 20an de marto, de la 2a ĝis la 4a posttagmeze.

Pro la sana stato, la ĜA okazos rete, per la rimedo Zoom, jen la ligilo:

- https://zoom.us/j/93312999414?pwd=M3pqNmVPMHJINi9MUGNYQkU2V1NFQT09

Eblas ankaŭ partopreni surloke por kelkaj homoj. La loko estas Domo de asocioj de Centro Parizo, salonoj 1-2, 5 rue Perrée. Ĉar la nombro de sidlokoj estas limigita, se vi deziras partopreni surloke, bonvolu peti tion al melprocuste-esperanto@laposte.net aŭ 06-32-36-21-28

Antaŭ la ĜA okazos baloto por validigi la agadraporton kaj la financan raporton de la pasinta jaro, kaj por elekti novan komitaton. La 2 raportoj legeblas en nia retejo al https://esperanto.paris/membro-kunvenoj La baloto okazos rete. Ĉiu membro ricevos mesaĝon de *balotilo.org* kun ligilo pro voĉdoni. La reta baloto finiĝos la 18an de marto. Escepte, kelkaj membroj, kiuj ne posedas retpoŝtadreson, voĉdonos poŝte, ilia poŝtaĵo devos atingi la sidejon plej malfrue la 18an de marto.

La tagordo de la ĜA estas la jena:

- publikigo de la rezultoj de la voĉdonado: konsento pri la 2 raportoj, elekto de nova komitato
- diskuto pri la partopreno en la venonta matematika foiro, rete, surloke, ambaŭ
- diskuto pri forigo en nia retejo de la paĝojn de malaperintaj asocioj
- prezento de la agadplano por 2021, peto de ideoj kaj helpo por novaj projektoj

Mi esperas vian partoprenon al nia ĝenerala asembleo kaj ĝojas tiam saluti vin.

Sincere via,

Marc Giraud, prezidanto